



Libera Pensgalopo

Tao Yuanming

Esperantigis Guozhu

陶淵明 闲情賦

2009 Ĉinio

RIMINVITE

Libera Pensgalopo vere
ŝokas por leganto timida,
pedanta kaj moralrigida,
per kanto aŭdaca kimere.

Kronprinco kritikas leĝere
ĝin makulo sur jado sida.

Libera Pensgalopo vere
ŝokas por leganto timida,

Sed Lusin komentas prefere,
ke ĝi estas verko solida
interesa, pri rev' senbrida,
nur memkonfesas tre sincere.

Libera Pensgalopo vere

Guozhu 2009-10-08

闲情赋也，浓艳绮丽。千百年来，褒贬不一。
昭明太子，为之惋惜。闲情一赋，微瑕白璧。
鲁迅先生，首肯赞许。胡思乱想，大胆有趣。
闲情赋也，共赏世译。

Tao Yuanming (365- 427)

Kanto pri Libera Pensgalopo

kun *Prefaco*

Antaŭe, Zhang Heng(78-139 p.K.) verkis <Kanton pri Bridita Amo>, kaj Cai Yong(132-192 p.K.) verkis <Kanton pri Kvietigita Amo> , ambaŭ en senĝenaj vortoj kun inklino al kvieta animstato. Komence ili disvolvis la konsiderojn de karierismo, kaj fine revenis al la memregado, tiel bridante la perversajn aŭ filistrajn pensojn, do konduto utila por bonvirta admono. Multaj beletristoj en postaj generacioj sekvis ilian modelon, kaj ofte disvastigis ekde similaj ideoj al pli ampleksa rezonado.

Loĝante en profunda strateto, mi havas ne malmulte da libera tempo; kaj, prenante plumon mi ankaŭ verkis la suban kanton. Kvankam kun ne tiom mirinda artefeko kiom de la antikvuloj; tamen, mi supozas, ke mi ne malobservis la esencan ideon de la aŭtoroj.

01

Vi estas belulino senkompara.

Pri via beleco sonu aklamo.

Via ĉarmo konkeras urbojn, landojn.

Pri via bonvirto cirkulas famo.

02

Tiel pura kiel jada pendaĵo,

tiel aroma kiel orkideo,

vi estas milda en filistra mondo.

Nubo ŝajnas via nobla ideo.

03

Bedaŭrinde: tro kurtas homa vivo,

mateno jam tuj fariĝis vespero.

Ĉiuj same vivlimas je jarcento.

Kial tristo? malofta ĝoj-apero?

04

Levinte kurtenon vi eksidiĝis
ludi liuton. Aŭdiĝis muzikoj
sub viaj delikate longaj fingroj.
Rave balancas neĝblankaj manikoj.

05

Sorĉas via fluanta okulumo.
Vi ludas ride, ĉiam en atento.
Melodio apenaŭ ĝis duono,
la suno subiras al okcidento.

06

Aŭtuna vento blovskuas arbaron.
Blanka nuboj zonas ĉirkaŭ montkruto.
Ĉielen ŝi rigardas al montpado,
poste daŭrigas ludon de liuto.
Alloge gracias ŝia figuro,
kun ĉarme trankvila milda konduto.

07

La bela melodio tre kortuŝas.
Pri intim-babulo ardas stimulo.
Mi volas viziti al ŝi persone,

sed ne kuraĝas pro ĝentil-skrupulo.

08

Alsendi ĉu bluan birdon heroldo?

sed alia hom' pli fruas? Mi time

tiel pensas, sen animo trankvila,

kiu flugis milfoje malproksime.

09

Mi volas iĝi via vestkolumo,

intime al rozvanga bonodoro.

Sed mi bedaŭras pri nokta disiĝo.

Tro longas aŭtuna nokt' sen aŭroro.

10

Mi volas iĝi via juprubando,

zone ligi ĉirkaŭ via talio.

Sed mi bedaŭras pri sezon-alterno,

ĉar vi tiam ŝanĝos ĝin per alio.

11

Mi volas iĝi via har-pomado,

ĉe via tempiharo brile pavos.

Sed mi bedaŭras pri ofta baniĝo,

senkore bola akvo min forlavos.

12

Mi volas iĝi via brova farbo,
moviĝi kun la okulparo stompa.
Sed mi bedaŭras pri frua forigo,
kiam kolor' ankoraŭ freŝas pompa.

13

Mi volas iĝi mat' sur via lito,
por akcepti kuŝon de korpo kara.
Sed mi bedaŭras pri vintra alveno:
atendos nin disigo unujara.

14

Mi volas iĝi brodita ŝuparo,
facilmoviĝi kun vi je imito.
Sed mi bedaŭras pri irhalto, ĉar mi
estos forlasita antaŭ la lito.

15

Mi volas iĝi via ombro tage,
kaj firme sekvante vin vagi ĉie.
Sed mi bedaŭras pri alta arbego,
en kies ombr' mi vidiĝas nenie.

16

Mi volas iĝi nokte la kandelo,
prilumi vian vizaĝon sub trabo.

Sed mi bedaŭras pri la sunleviĝo,
kiu forigos min per lumorabo.

17

Mi volas iĝi bambu-ventumilo,
en via man' svingiĝas je adaĝo.
Sed mi bedaŭras pri falo de roso,
vane sopiri pri via vizaĝo.

18

Mi volas iĝi gracia liuto,
ame ludata sur via genuo.
Sed mi bedaŭras ke post ĝojfinalo,
vi puŝos min al muta sonvakuo.

19

Ĉar realiĝis neniun deziro,
mi dronas vane ĉiam en amaro.
Al kiu mi malfermu mian koron?
Mi nur promenas en suda arbaro.

20

Ripozo ĉe magnolio kun roso.
Kaj vasta ombro sub pino troviĝas.
Kiun mi povus renkonti promene?
Ĝoj' kaj timo en mi certe miksiĝas.

21

En soleca arbar' neniun vidis.
Revante vin trovi tie deziras.
Nun mi revenas laŭ malnova vojo.
Vidante sunsubiron mi suspiras.

22

Kiom da plezuro en piediro?
Ekmalheliĝas pejzaĝo vespere.
Falas folioj de branĉoj pelmele,
Je vento malvarmo pikas libere.

23

La suno subite malaperis,
ankaŭ la luno post nubon forire.
Birdo solece lamentis revene.
Besto atendis partneron sopire.
Mi bedaŭras pri pase' en oldaĝo,
pri la nuno finiĝanta suspire.

24

Ĉu mi vidos vin ĉinokte en sonĝo?
Ho, mi ne povas teni min trankvila!
kvazaŭ boato perdinta remilon,
aŭ grimpanto ĉe klifo malfacila.

25

Tiam uestaj steloj hele brilas,
kaj la norda vento hurlas ulule.
Mi ne povas refoje endormiĝi.
Kaosaj pensoj misvagas cirkule.

26

Mi leviĝis por atendi aŭroron.
Abundas blanka prujno sur perono.
Kokoj ankoraŭ dormas sen kokeriko.
Fluas melankolie fluta sono.

27

Komence la sono aŭdiĝas paca,
fine sonora donante suspiron.
Ho, kie vi troviĝas, mia kara!
Nuboj transdonas mian amsopiron.

28

Ŝvebe forflugas nuboj en silento.
Ankaŭ la tempo rapide forpasas.
Koro plenplenas de sopir-turmento.
Disigaj montoj riveroj amasas.
Renkonte al vent' por forigi lacon.
Senfinan sopiron al ondoj lasas.

Je intervidiĝo ni ambaŭ kantu
 kanton el la Libro de Poezio.
 For ceteraj pensoj, restu sincero.
 En vasta spac' eternu ampasio!

Trad.Guozhu 2008-10-30

陶渊明

闲情赋并序

(序)

初，张衡作《定情赋》，蔡邕作《静情赋》，检逸辞而宗澹泊，始则荡以思虑，而终归闲正。将以抑流宕之邪心，谅有助于讽谏。缀文之士，奕代继作；因并触类，广其辞义。余园闾多暇，复染翰为之；虽文妙不足，庶不谬作者之意乎。

(正文)

夫何瑰逸之令姿，独旷世以秀群。表倾城之艳色，期有德于传闻。
 佩鸣玉以比洁，齐幽兰以争芬。淡柔情于俗内，负雅志于高云。
 悲晨曦之易夕，感人生之长勤；同一尽于百年，何欢寡而愁殷！
 褰朱帟而正坐，泛清瑟以自欣。送纤指之余好，攘皓袖之缤纷。
 瞬美目以流眄，含言笑而不分。
 曲调将半，景落西轩。悲商叩林，白云依山。
 仰睇天路，俯促鸣弦。神仪妩媚，举止详妍。
 激清音以感余，愿接膝以交言。欲自往以结誓，惧冒礼之为愆；
 待凤鸟以致辞，恐他人之我先。意惶惑而靡宁，魂须臾而九迁：

愿在衣而为领，承华首之余芳；悲罗襟之宵离，怨秋夜之未央！
 愿在裳而为带，束窈窕之纤身；嗟温凉之异气，或脱故而服新！
 愿在发而为泽，刷玄鬓于颓肩；悲佳人之屡沐，从白水而枯煎！
 愿在眉而为黛，随瞻视以闲扬；悲脂粉之尚鲜，或取毁于华妆！
 愿在莞而为席，安弱体于三秋；悲文茵之代御，方经年而见求！
 愿在丝而为履，附素足以周旋；悲行止之有节，空委弃于床前！
 愿在昼而为影，常依形而西东；悲高树之多荫，慨有时而不同！
 愿在夜而为烛，照玉容于两楹；悲扶桑之舒光，奄灭景而藏明！

愿在竹而为扇，含凄飒于柔握；悲白露之晨零，顾襟袖以缅邈！
愿在木而为桐，作膝上之鸣琴；悲乐极而哀来，终推我而辍音！

考所愿而必违，徒契契以苦心。拥劳情而罔诉，步容与于南林。
栖木兰之遗露，翳青松之余阴。悦行行之有覿，交欣惧于中襟；
竟寂寞而无见，独悁想以空寻。敛轻裾以复路，瞻夕阳而流叹。
步徙倚以忘趣，色惨惨而就寒。叶燮燮以去条，气凄凄而就寒，
日负影以偕没，月媚景于云端。鸟凄声以孤归，兽索偶而不还。
悼当年之晚暮，恨兹岁之欲殫。思宵梦以从之，神飘飘而不安；
若凭舟之失棹，譬缘崖而无攀。
于时毕昴盈轩，北风凄凄，炯炯不寐，众念徘徊。
起摄带以侍晨，繁霜粲于素阶。鸡敛翅而未鸣，笛流远以清哀；
始妙密以闲和，终寥亮而藏摧。意夫人之在兹，托行云以送怀；
行云逝而无语，时奄冉而就过。
徒勤思而自悲，终阻山而滞河。
迎清风以怯累，寄弱志于归波。
尤《蔓草》之为会，诵《召南》之余歌。坦万虑以存诚，憩遥情于八遐。

Tao Yuanming kaj lia <Libera Pensgalopo> 陶渊明与闲情赋

Guozhu 国柱 (2009-10-17)

Oktobro. Belaj Lushan kaj sezono. 十月美景又良辰，

Prelego pri Tao en lia hejmloko. 渊明故乡说渊明。

Kvankam ardas disput' pri naskvilaĝoj. 几处故里有争议，

Tamen ke en Jiang-xi certe sen ŝoko. 五柳先生江西人。

Abundas koraj laŭdoj kaj admiroj. 衷心推崇与赞许，

Kaj la Majstro Ouyang Xiu kun kompreno 粉丝众口且同声。

opinias ke en Jin-dinastio 除去一篇归去来，

ne estas inda verko krom <Reveno>. 欧阳修曰晋无文。

Xiao Tong, la Kronprinco Zhaoming, bedaŭras 昭明太子称遗憾，

pri la jada makulo <Pensgalopo>. 白璧微瑕在闲情。

Disputo pri la temo ĉiam daŭras. 或曰爱情或比兴，

Metafore ĉu pri amo aŭ tropo. 主题历来有纷争。

Su Shi pledas ĝin konforma al virto: 苏轼谓合风骚旨，

Jes amoravida, sed diboĉbrida. 国风好色而不淫。

Laŭ opinio de Sinjoro Lusin, 鲁迅先生题未定：

jen verko interesa kaj solida. 坚实有趣的作品。

Erotikaĵoj legiĝas ankaŭ en 试看艳歌入经典，

Biblio kaj Libro de Poezio. 请读圣经与诗经。

Alia brila ekzempl' de Tennyson 老外也写闲情赋，

same kantas en ama melodio. 人同此心丁尼生。

Nin multe kortuŝas la revoj iĝi 诗中精彩有十愿，

liuto ĉe belulin' kun muzikoj. 愿作美人膝上琴。

Nun mi la unuan esperantigon 首次译为世界语，

dedicxas al vi, karaj geamikoj! 庐山论坛献知音。

Alfred Tennyson (1809-1892)


La Filino de Muelisto

Jen estas filino de muelisto,
ŝi kreskas tiel bela, tiel bela.
Mi volas iĝi jada orelringo,
trembrili ĉe ŝia paro orela,
tagnokte en ŝia bukloro kuŝi,
kaj ŝian blankan varman kolon tuŝi.

Mi volas fariĝi silka rubando,
zoni ĉirkaŭ ŝia svelta talio.
Kaj ŝia koro batas tuj kontraŭ mi,
ĉu en trankvilo aŭ melankolio.
Kaj mi scios kiam ĝi batas bone,
mi firme ĉirkaŭprenu ĝin persone.

Mi volas iĝi perla ĉirkaŭkolo,
tutan tagon ĉe ŝia kolo pendi,
leviĝi aŭ fali sur ŝia brusto,
de ŝia rido aŭ spiro dependi.
Mi servu milde milde je deĵoro,
neniam disiĝi je nokta horo.

Trad. Guozhu



[英]阿尔弗雷德·丁尼生(1809-1892)

磨房主的女儿

这是那磨房主人的女儿，出落得有多么美丽漂亮。
我愿化做那光洁的玉坠，在她耳垂边轻轻地悠荡；
我日夜在她鬓发里躲藏，抚摸她温暖雪白的颈项。

我愿化做她束身的缎带，绕在她婀娜纤细的腰间。
她的心儿将紧贴我跳动，无论是忧伤或恬静安闲；
我会将它紧紧搂在怀中，知悉它是否正常地搏动。

我愿化作她的那串项链，整天挂在她的粉颈之上，
伴随着可人的一颦一笑，起伏在她那芬芳的胸膛；
我会轻轻躺下敛声屏息，即使是夜里也不被摘掉。

阿尔弗雷德·丁尼生(Alfred Tennyson, 1809-1892)是英国 19 世纪的著名诗人，在世时就获得了极高的声誉。他深受维多利亚女王的赏识，于 1850 年获得了桂冠诗人的称号，后来又在 1884 年被封为男爵。